


NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku Klubu pracujících v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor - Dr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště 325
Cena: dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odbor kultury čj. 145/74 – 456/4

Numero 4 Decembro 1981 Září Číslo 4

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Intervjuo (Esperantigis Ema Vodičková, Hradec Králové)

La 15-an de marto 1981 la nederlanda televido elsendis (vysílala) intervjuon kun inventinto (vynálezcem) de la neŭtrona bombo, usonano (Usono = USA) Samuel Cohen. La nederlanda raportisto Frank Wiering iris al Los Angelos por serĉi lin en lia luksega vilao. La intervjuo estis publikigita en la nederlanda progresema periodaĵo „De Groene Amsterdammer“ la 18-an de marto 1981. Jen la intervjuo:

Wiering: Kiam vi inventis la bombon?
Cohen: En somero 1958. La komisiono de la Ministerio de Defendo petis min pristudi la eblecon fari nuklean armilon por uzado sur batalkampo. Mi tiam vojaĝis al unu el la laboratorioj, kie mi malkovris eltrovon, el kiu estiĝis neŭtronbombo. (Cohen sidas ĉe la tableto kaj skizas silueton de la urbo). Alte en la aero, proksimume (přibližně) 1000 metrojn super la urbo, mi eksplodigas mian bombon. Pro la eksplodo ĉiuj neŭtronoj samtempe eliĝas (vylučují se) kaj priradias ĉi tiun regionon. Pro tio oni devas eksplodigi la armilon alte en la aero, la detrua efiko de varmego kaj aerpremo estas tenata malproksime de la tersurfaco (povrchu země). Tial oni priskribas la bombon kiel armilon, kiu mortigas homojn sed kiu indulgas (šetří) proprietaĵojn (vlastnictví). Kiam oni demandas min, ĉu ne estas malmorale mortigi homojn kaj indulgi konstruaĵojn, tiam mi diras: La homoj estas malamikaj soldatoj kaj indulgi civitanajn proprietojn estas tute juste.

Ĉu vi deziras kokakolon? (Laŭ Cohen civitanoj povas fari jenon, kiam eksplodas atommilito: foriri, se estas tempo, aŭ kaŝi sin subtere en ŝirmejoj). (Li daŭrigas: Se NATO decidus uzi neŭtronajn armilojn en Eŭropo, la konstruado de ŝirmkeloj (krytů) por civila loĝantaro estas facila kaj malmultekosta – por ĉiu proksimume 100 dolarojn.) Tio estas ĉio. La ŝirmado estas tial malmultekosta, ĉar oni devas ŝirmi sin nur kontraŭ radiado. Ŝirmado kontraŭ aeropremo ne estas bezonata.

W.: Mi komprenas. Sed strange estas, ke vi ĉiam parolas pri Eŭropo. Pri milito en Eŭropo. Kaj hazarde mi loĝas tie.

C.: Estas logike ke mi parolas pri Eŭropo. Mi pri tio povas diri nur ke vi malfeliĉe estas najbaroj de la soveta bloko. Vi estas minacata.

W.: Kio okazas al soldatoj, super kiuj eksplodas la bombo?

C.: Tiuj estos gravege tuŝitaj de intensa priradiado per neŭtronoj. La plej multaj el ili en kelkaj minutoj estos paralizitaj. La radiado difektas la centran nervosistemon. Ili ne plu povos funkcii. El pli granda distanco la radiado difektas la digestan (zažívací) sistemon. La simptomoj similas al tiuj de grava ĥolero. Ankaŭ ili ne povos funkcii.

W.: Ĉu ili mortos?

C.: Jes. La plej multaj el ili mortos post iom da tempo. La tankistoj en radiuso de tricent metroj de la eksplodo pro ŝoko paraliziĝos kaj mortos en daŭro de du tagoj. Ĝis 600 metroj de la eksplodo la paralizo daŭras 5 ĝis 45 minutojn. Ili tamen mortos post semajno. Inter 600-1000 metroj la tankistoj povos daŭrigi la batalon (v bitvě), sed ili mortos dum kelkaj semajnoj.

W.: Via filo deĵoras ĉe la floto. Kion vi faros, se via filo viktimiĝos pro via bombo?

C.: Ho ne! Ne la floto. La bombo ne estos uzata surmare.

W.: Ĉu vi preferas, ke li estas minacata de torpedo aŭ de N-bombo?

C.: Mi preferas de torpedo. Torpedoj efikas inverse. Ili detruas materialojn, ne vivojn. Mi do preferas, se lia ŝipo estas atakata per torpedoj, ĉar la bombo mortigas homojn kaj indulgas ŝipon.

W.: Ĉu vi rilate al tio dum la pasintaj dudek jaroj neniam pensis: „Ho dio, kion mi inventis (vynalezl)?“

C.: Ne, neniam ajn. Ĉi estas la plejplej akurata armilo iam eltrovita (vynalezená). Ti ŝajnas esti fanfaronaĵo (vychloubání), tamen ĝi estas vero. Ion tian la mondo neniam vidis.

W.: Ĉu vi supozas, ke okazos milito?

C.: Jes. Estas terure diri tion. Mi kredas, ke militado estas karakterizaĵo de la homo. Ĉiam estis militoj, precipe en Eŭropo. Ĝi ĉiam estis tre militema. Kaj en ĉiu milito ĉiuj partioj uzis ĉiujn armilojn, kiujn ĝi havis je dispono. Mi do supozas, ke denove eksplodos milito, kvankam mi ne povas diri kiam tio okazos. Kaj certe estas ke en tiu milito estos uzataj (užity) ankaŭ nukleaj armiloj. Nuntempe mi laboras pri defendsistemo, en kiu estos uzataj nukleaj armiloj, do ankaŭ neŭtronaj bomboj por reteni tro grandajn armeojn. Tiu plano ampleksas ankaŭ nuklearmilan barieron, kiun mi pristkirbas kiel nacian defendilinion laŭ longe de la landlimoj. Oni uzas ian formon de nuklea energio por reteni la malamikon.

W.: Tiu linio troviĝas en Eŭropo?

C.: Jes, mi precipe pensas pri Eŭropo. Tia sistemo tre bone estus uzebla sur limo inter Okcidenta kaj Orienta Germanio, la Fera Kurteno. Sed germanoj forte rezistas kontraŭ tiaj planoj.
W.: Ĉu vi mem trovas vin sciencisto?
C.: Jam ne, tute ne. Eble sonas strange en la oreloj de via televidaspektantoj, sed mi taksas min kiel humaniston.
W.: Kiel humaniston? Ĉu ne strange?
C.: Jes eble, sed mi estas tre honesta.
W.: Ĉu vi volonte eltrovas armilojn?
C.: Honeste dirite, jes. Ĝi estas tre interesa okupiĝo.
W.: Kiel oni povas kreade (tvořivě) labori, farante neniigilojn?
C.: Pardonu, la neŭtronbombo ne estas neniigilo…
W.: Sed ĝi mortigas homojn!
C.: Jes, malamikajn soldatojn. Tio ja apartenas al la milito. Tiel ĉiam estis.
W.: Kiun vi plej amas en la mondo?
C.: (karesante sian hundon) Ĝin mi plej amas. Sed ne diru tion al mia edzino kaj infanoj; ili kolerus.

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxm

Raportoj por la junularo de s-ano Malovec.

PRINTEMPA RENKONTIĜO. Laŭ interkonsento inter HEJ, JK de ĈEA kaj JES okazos de la 7a ĝis la 9a de majo 1982 en Slovakio trinacia Esperanta junulara renkontiĝo. Ĝi estos kultura kaj turisma aranĝo. Vi loĝos en hotelo Esperanto en Pribylina (regiono de Altaj Tatroj) en du kaj trilitaj ĉambroj. En programo estas turismaj ekskursoj, kulturaj vesperoj kaj aliaj programeroj. Partoprena kotizo estas 250 kronoj por enlandanoj kaj 350 kronoj por eksterlandanoj. Hungaraj esperantistoj pagos al HEA laŭ informoj. La ĉeĥaj gejunuloj petu aliĝilojn ĉe adreso: Miroslav Malovec, Charkovská 7, 62500 Brno-Bohunice. La plenigitan aliĝilon poste sendu al jena adreso: Asocio de Esperantistoj en Slovaka socialisma Respubliko, Sobotské námestie 6 05801 Poprad, ČSSR. -

JUNULARA-ESPERANTO-LERNEJO okazos de 4.7.82 ĝis 7.7.82 en orient-slovakia banurbo Bardejov. Krom trigrada instruado kaj feriado en internacia junulara medio atendas vin varia programo, kiel ekskursoj, banado en termala akvo, dancamuzoj k.s.

Zprávy pro mládež s-ana Malovce

JARNÍ SETKÁNÍ. Podle dohody mezi HEJ, Junulara komisiono ČES a JES bude uspořádané od 7. do 9. května1982 na Slovensku třínárodní esperantské setkání. Charakter turistický a kulturní. Budete bydlet v hotelu Esperanto v Pribylině (kraj Vysokých Tater) ve dvou- a třílůžkových pokojích. Na programu jsou turistické výlety, kulturní večery a jiné části programu. Účastnický poplatek je 250 korun pro tuzemce a 350 korun pro zahraniční hosty. Maďarští esperantisté budou platit HEA podle informací. Čeští mládežníci vyžádejte si přihlášku na adrese: Miroslav Malovec, Charkovská 7, 62500 Brno-Bohunice. Vyplněnou přihlášku pošlete potom na adresu: Zväz Esperantistov Slovenské Socialistické Republiky, Sobotské námestie 6, 05801 Poprad, ČSSR.

Mládežnická esperantská škola bude uspořádána od 4. do 17. července 1982 ve východo-slovenském lázeňském městě Bardějov. Kromě třístupňového vyučování a prázdnin v mezinárodním esperantském prostředí očekává Vás pestrý program, jako výlety, koupání v termální vodě, taneční zábavy apod.

Loĝado en 3-litaj ĉambroj en moderna hotelo. Partoprenkotizo 800 Kčs, eksterlandanoj 1000 Kčs. Aliĝilojn akceptas: Stano Marĉek, Zvolenská 15, 03601 Martin, ĈSSR.

SET LANĈOV – la somera tendaro de esperantistoj apud baraĵlago de Vranov denove bezonas helpon de la junularo. En la monatoj aprilo, majo, junio 1982 okazos en la tendaro ĉiun semajnfinon laborbrigadoj por finkonstrui kabanojn kaj lavejojn. Gejunuloj el suda Moravio, kiuj volas helpi, aliĝu ĉe la adreso Esperanto, 67401 Třebíč. Nia junulara komisiono klopodos akiri gejunulojn ankaŭ por helpo dum la etapoj mem, en funkcioj instruistaj, ekonomiaj, organizaj kaj laboraj, por ke ĉiuj tri etapoj denove iĝu precipe junulara afero.

AŬTUNA RENKONTIĜO estos organizata de JK ĉe ĈEA en Žďár n.Sáz. en la hotelo Talský mlýn. La pli detala informoj estos ankoraŭ ĝustatempe publikitaj.

PRINTEMPA RENKONTIĜO de esperantistoj en Mnichovo Hradiště okazos la 14-an ĝis 16-an de majo1982. Ĝi havos amikan kaj instruan karakteron precipe por paroligi tiujn, kiuj ne havas okazon por E-konversacio (8 instruhoroj). Petu frutempe aliĝilon!

Ubytování ve 3-lůžkových pokojích v moderním hotelu. Poplatek 800 Kčs, zahraniční 1000 Kčs. Přihlášky přijímá: Stano Marček, Zvolenská 15, 03601 Martin, ČSSR.

SET-Lančov letní tábor esperantistů na přehradním vranovském jezeře znovu potřebuje pomoc mládeže. V měsících dubnu, květnu a červnu 1982 budou uspořádány v táboře o každém víkendu pracovní brigády k dokončení výstavby chat a umýváren. Mládežníci z Jižní Moravy, kteří chtějí pomoci, hlaste se na adresu: Esperanto, 67401 Třebíč. Naše mládežnická komise bude se snažit získat mládež také pro pomoc během vlastních běhů, do funkcí učitelů, hospodářských organizačních a pracovních, aby se všechny tři etapy staly především mládežnickou záležitostí.

PODZIMNÍ SETKÁNÍ bude organizováno JK při ČES ve Žďáře n.Sáz. v hotelu Talský mlýn. Podrobnější informace budou ještě včas zveřejněny.

JARNÍ SETKÁNÍ esperantistů v Mnichově Hradišti bude uspořádáno od 14. do 16. května 1982. Bude mít přátelský a instruktivní charakter zvláště, aby se umožnilo konversaci těm, kteří nemají příležitost k E-konversaci (8 vyučovacích hodin). Vyžádejte si přihlášku včas!

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxm

Forpasis s-ano Josef Knébl la 1-an de decembro 1981 en Ml.Boleslav. Li naskiĝis la 15-an de marto 1906 en Mn.Hradiště, esperantiĝis dum la unua rektmetoda kurso de italo Facchi en 1930 en Mn. Hradiště, 1973-1981 estro de nia klubo. Li estis inteligenta, modesta homo kun vastaj interesoj.

E-on li uzis ankaŭ en korespondado pri abelbredado, kiu estis krom E-o lia ŝatokupo. Li modele zorgis pri la agado de nia grupo, kvankam dum lastaj du jaroj grave malsana. Li zorgis precipe pri ekonomia flanko de nia rondeto. Li funebras kun la familio de la forpasinto.

Odešel s-ano Josef Knébl 1. prosince 1981 v Mladé Boleslavě. Narodil se 15.března 1906 v Mnich. Hradišti. 1973-81 byl předsedou našeho kroužku. Byl to inteligentní a skromný člověk se širokými zájmy. E-a užíval také v korespondenci o včelaření, které bylo kromě E-a jeho koníčkem. Vzorně se staral o činnost naší skupiny, ačkoliv byl v posledních dvou letech těžce nemocen. Staral se především o ekonomickou stránku našeho kroužku. Sdílím smutek s rodinou zemřelého.

LIAZ 02-KP/81-Hr/22

Pluaj finstudintoj de la baza koresponda kurso el la grupo de la lektoro Dro Hradil:

Další absolventi písemného kursu základního ze skupiny lektora Dr Hradila:

Eichler Pavel, 1953, 54102 Trutnov, Horská 448
Lenz Stanislav, 1936, 10000 Praha 10, Vršovice, Na stezce 3
Marková Alena, 1954, 75661 Rožnov p.Radh, Fučíkova 896
Štoll Bohumil, 1954, 19000 Praha 9, Vysočany, Klímova 210/3
Šindler Jiří, 1954, 40500 Děčín VII, Vilsnická 63/7

Ni deziras al ĉiuj plenan ĝojon dum uzo de Esperanto, kiu beligos kaj riĉigos ilian vivon!

Přejeme všem plnou radost při užívání Esperanta, které zkrásní jejich život!

Seminario pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko okazis en aŭgusto en Žilina. Ĝi havis grandan sukceson. Partoprenis 170 fakuloj el 13 landoj. Prezentiĝis 54 prelegoj, pliparte pri la vivmedio. Partoprenis ankaŭ kelkaj reprezentantoj de eksterlandaj institucioj, i.a. de la ministerio pri klarigaj afreroj de BPR.

Seminář o využití E-a ve vědě a technice byl uspořádán v srpnu v Žilině. Měl velký úspěch. Účastnilo se 170 odborníků ze 13 zemí. Bylo předneseno 54 přednášek, většinou o životním prostředí. Účastnilo se i několik zástupců zahraničních institucí, m.j. ministerstva osvěty BLR.

En kadro de la Internacia Foiro en Leipzigo, urbo de la vigla e-a vivo, okazos (12-14.3.82) renkontiĝo de esperantistoj kun riĉa programo (librofoiro, vizito de la urbo, interkonatiĝa vespero, kuna vizito de la foiro k.a.). Aliĝu ĉe: Kulturbund de DDR. Organiza komitato de IFER, DDR, 7010 Leipzig, Käthe-Kollwitzstrasse No 115.

V rámci mezinárodního veletrhu v Lipsku, městě čilého e-života, bude (12.-14.3.1982) uspořádáno setkání esperantistů s bohatým programem (knižní bazar, návštěva města, seznamovací večer, společná návštěva veletrhu aj.). Přihlášky:

Komputista grupo de ISAE aktivas periodaĵo „Komputado"-kasedo „Komputilo proksimiĝas al homo" –perletera konferenco en Francio -Marborda ripoztendaro en Bulgario 1982 – informu ĉe Ing.J.Vojáček, Ukrajinská 21/16, 62500 Brno

Komputer-istická skupina při ISAE je aktivní: periodikum „Komputado" -kazeta „počítač se přibližuje člověku" -písemná konference ve Francii -rekreace u moře v Bulharsku 1982 – informujte se u Ing J.Vojáčka, Ukrajinská 21/16, 62500 Brno.

Nova tempo – la soveta semajgazeto aperanta en 10 lingvoj informas en No 42 (p.30) ampleksan informon pri la Monda Esperantistia pacmovado MEM. Ĝi pozitive taksas ĝian kontribuon por la pacideo inter la popoloj.

Nová Doba – sovětský týdeník vycházející v 10 jazycích přináší v č.42 (str.30) obsáhlou informaci o Světovém hnutí esperantistů pro mír. Kladně hodnotí jeho přínos myšlence míru mezi národy.

Universala Kongreso de Esperanto okazos 1982 en Antverpen-Belgio. Partoprenon ebligos ankaŭ nia Ĉeĥa esperanto-Asocio pere de aŭtobusa ekskurso (ĉirkaŭ 14000 Kčs) kun survoja apudprogramo (24.-31.7.1982).

67.Světový esperantský kongres bude se konta 1982 v Antverpách – Belgie. Účast umožní i náš Český esperantský svaz autobusovým zájezdem (okolo 14000 Kčs) s vedlejším programem cestou (24.-31.VII.1982)

LIAZ 02-KP/81-Hr/23

Nedeviga instruado de Esperanto post Hungario estis oficiala enkondukita por 9-a lernojaro en bazaj lernejoj ankaŭ en Bulgario.

Nepovinné vyučování esperantu bylo po Maďarsku oficiálně zavedeno pro 9.ročník základních škol také v Bulharsku.

Sukcesa renkontiĝo de E-istoj okazis (22.+23.VIII.) en Příbram. Ĝi elstaris pro bonega organizado. Partoprenis 200 esperantistoj ankaŭ el GDR, Britanio, Nederlando.

Úspěšné setkání esperantistů bylo uspořádáno 22.+23. VIII v Příbrami. Vyniklo výbornou organizací. Účastnilo se 200 esperantistů, také z DDR, Anglie a Holandska.

Max Hillebrand, la vigla funkciulo de E-klubo Jablonec nN., kvindekjariĝis . Li akceptu bondeziron de nia redaktejo kaj da la milkvincentnombra civito de niaj legantoj.

Max Hillebrand, čilý funkcionář E-klubu v Jablonci nN oslavil padesátiny. Nechť přijme blahopřání naší redakce s tisícpětisetčlenné obce našich čtenářů.

GRAMATIKA ANGULO: Krom baza gramatika verko de Waringhien-Kaloscay.
Plena analiza gramatiko – aperis du gravaj frazeologioj: Domfabriko (6000 fraz—oj – havebla ĉe ĈEA-39 Kčs) kaj „Kiel diri? Lentaigne“ – 15 FF Francio. Temas pri frazoj ĝenerale agnoskitaj, pliparte el Plena Ilustrita vortaro. Jen kelkaj esprimoj el Lentaigne: (esprim-nesto: Admoni-riproĉi-pardoni): Ne hontu pri la faro, hontu persisti en eraro. - Fari stultaĵojn. Malhonestaĵojn. - Malobei. - Trapasi malpermeson.-Agresa tono.-Agi sub influo de…-Ĵeti la kulpon sur iu. - Esti pura de peko. Havi blankajn manojn. Kompreni la gravecon de sia *kulpo.* - Mi ne volas fari al mi aflikton (zármutek) pro tio. - Severa admono, averto. Puninda kulpo. - Perdi sian paciencon. - Stultulo trovas ĉiam pli grandan stultulon, kiun li admiras. - Doni al iu malgrandan averton ne fari tion. Patre admoni. - Silenta riproĉo. - Riproĉa rigardo. - Akraj riproĉoj. - Pike riproĉi. - Lavango da riproĉoj. - „Skoldi“ (=riproĉadmoni). - Meriti riproĉojn, la vergon, vangofrapon, bastonbatojn. Pugvergi. - Brutale trakti iun. Fari al iu bonan lavon. - Sapumi al iu okulojn.laŭmerite punita.severa sed justa … Ŝpari nek penon nek admonon. Fari al iu predikoj pri moroj. Doni al iu moralinstruon, predikon pri moroj. Instrui al iu kiel paŝi rekte. Doni virtan ekzemplon al iu. - Ludi la virtulon. Preni la ekzemplon de iu. Malsaĝa amiko estas pli danĝera ol malamiko. - Efika admono. Afabla vorto pli efikas ol forto. - Stultigi infanon per senĉesaj admonoj kaj riproĉoj. - Grumbli flanken. - Murmuri tra la dentoj, en sian barbon. - Forĵeti konsilojn. Malatenti la riproĉojn. - Ne ami edifaj moralaĵojn.- Akcepti la riproĉojn sen palpebrovibro.-Balbuti pardonon.-Pente bedaŭri. Bati sin pentosigne sur la bruston. - Fari bonajn promesojn. Pardoneble, eraro, kulpo. Mi pardonas kondiĉe, ke vi neniam kulpu tiun kulpon. - Preta *respondi* la pasintaĵon. Pardoni ĝis plena forgeso. Li ne esperu pardonon. Mi bedaŭras mian severecon. Bonaj ekzemploj pli forte influas el admonoj. / Tio ne helpon lin.

---

Alvoko: Kiu volus partopreni kolektivan tradukadon, skribu al la redaktoro. Kunvenoj necesaj. (Propono de la kolektivo: Ĉefredaktoro kaj tradukistaj duopoj – laboro en duopoj: ĉiu havos sian oponanton reciprokan. Se vi havas ĉeĥan verkon ne grandan, konvenan por grupa tradukado, proponu ĝin.)
Due: Kiu povus pruntedoni al nia rondeto ĉeĥan proverbaron, eventuale frazeologion?

LIAZ 02-KP/81-Hr/24

Korespondi deziras: Du junuloj (25-jara sperta esperantisto kaj 19-jara malpli sperta) volas korespondi kun ĉs knabinoj pri ĉiuj temoj – skribu al Vochin Marian, Ĉasuta postala 3093, 71400 Bucuresti, Rumanujo
23 gekomencantoj (16-18j) studantaj la industri-mezlernejon de muzikinstrumenta fabrikado dez kor kun samaĝaj gekomencantoj pri ĉiuj temoj. Esperantgrupo „KLEO", 35801 Kraslice-PS 320/6
John C.Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, *Aroz na 85018*, US dez kor pri internacia pacdevigo.
Pro perfektigi lingvoscion volas korespondi 30-jara f-ino Nisrat Forogh, Mikrojan Block 28A, Ap 33,
Afganistano.
Irina Seldova, 16-jara knabino, Prospekt M.Toreza 13-4 SU-1904021 Leningrad USSR kol poŝtmarkojn kaj diversajn esperantaĵojn.
Mehdi Zargapur, P.O.Kesto 410 Busher, Irano dez tutmonde korespondi kun denaskaj esparantistoj.
Kazimier Dobrovski, ul. Koreanska 1/226 PL 52-121, Wroclaw, 23-j dez kor pri literaturo, fremdaj lingvoj kaj turismo.
Firuzeh Moattar, Teheran-Gholhak-Dowlat Ave., Ashafi Sarraf Ave.No 26 Teheran 19, Irano, 18-j, f-ino dez kor tutmonde pri ĉiuj temoj.
14-15 jaraj gelernantoj dez kor: Esperanto-kurso Astradskolan, S-34100 Ljungby, Svedio.
Kun virinoj junaj kaj pli aĝaj dez kor 19-jara s-ro Heidari Kareh, Yousef-abad-Bistoon St.6 A Abe. No 1, Teheran, Irano.
Junulara pasorta Servo de TEJO. Gastingantoj bezonataj lpor 1982. Organizanto J.M.Cash, 5, Allées des Félibres, F-51520 Ramonville-St. agne, Francujo.
Tutmonda esperantista adresaro 1981-aĉetebla ĉe InfoServo, Bismarck-str 28, D-3550 Marburg. Ni posedas unu ekzepleron kaj ni povas sendi al vi adreson de la korespondamiko laŭ via deziro.

xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
x

Esperantský kroužek
klubu pracujících
CS 29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Presaĵo
Imrimé 50%

LIAZ 02 81/25-KP/Hr